

NIA PONTO



Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)

Redaktas:

Jesús Miguel García Iturrioz



Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

En Fejsbuko, serĉu “esperanto grupo bilbao”

Jar-kotizoj: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Junaĝis 30 jaroj): 20 €.

KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550

JANUARO/MARTO 2022

Nro. 130 (1/22)



80^a | HISPANA
ESPERANTO-
KONGRESO

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Comillas
Kantabrio
2022

de la 29a de aprilo
ĝis la 3a de majo

KantEA | FEDERACIO
DE ESPERANTO
DE HISPANIA



Jam alproksimiĝas la dato por la 80a kongreso de Hispana E-Federacio, kiu ĉi-foje okazos ne tro malproksime de nia regiono: en la belega kantabra urbo Comillas, de la 29a de aprilo ĝis la 3a de majo. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, eblas tion fari en <http://www.esperanto.es/kantea/eo/aligilo/> aŭ mem en nia E-Grupo de Bilbao.

LOKE ...

Nova renkontiĝo kun niaj amikoj de Turingo (Germanio).



La sabaton 27an de novembro okazis nova virtuala renkontiĝo kun amikoj el urbo Turingo (Germanio), kiun ankaŭ partoprenis francoj. El nia E-Grupo partoprenis 3 homoj: Pako, Iñigo kaj Edorta.

La renkontiĝo ripetigis la sabaton 26an de februaro.

La scienca lerneja kalendaro atingis nian Grupon.



Tiel kiel ni jam informis, la hispana CSIC (Centro Superior de Investigaciones Científicas - Supera Organizo pri Scienca Esplorado), petis kunlaboron al HEF por traduki al Esperanto sciencajn kalendarojn, kiu estos liverata al lernejoj de la tuta lando.

En tiu kalendaro, ĉiutage aperas datreveno de scienca okazaĵo. HEF ricevis kelkajn ekzemplerojn, kiujn Ĝi sendis al hispanaj lokaj grupoj.

Al Bilbao alvenis antaŭ kelkaj semajnoj kaj vi povas ĝin rigardadi sur muro de nia sidejo.



LOKE ...

Gelernantoj plu vizitadas nian sidejon.



Spite de KOVIM-19 kaj de malkonvena vintra vetero, la gelernantoj de la lasta E-kurso daŭrigas la vizitojn al nia sidejo. Tie tuj oni okazigas rondajn paroladojn, kie miksiĝas novbakitaj esperantistoj kun aliaj pli veteranaj por interŝanĝi opiniojn pri la plej diversaj aferoj. Kompreneble, la ĉefa celo estas praktiki Esperanton, sub la gvidado de nia nelacebla amiko David.

Se vi deziras praktiki nian lingvon, venu. Kaj ne timu pro malalta lingvoscio; la aliaj helpas kaj paroligos vin.

Ni ne sukcesis en la kristnaska loterio.



Unu jaron plian, ni ne sukcesis atingi premion en la kristnaska loterio. Tamen, tio ne estas obstaklo por kore danki ilian helpon al ĉiuj, kiuj aĉetis niajn biletojn, skribitajn tute en Esperanto, kaj kiuj, samtempe, per eta mondonaco helpis al la subteno de nia E-Grupo.

Ni substreku ke estis aĉetantoj laŭlonge de la tuta Hispanio, kio faris ke niaj vendoj per interreto estis pli

multnombraj ol neniam antaŭe.

Koran dankon!

Nia sociaro.

Dum la jaro 2021, al la E-Grupo de Bilbao,

Aliĝis 1 homo.

Eksis 1 homo, kiu mortis.

Je la fino de 2021, ni nombris 54 anojn.

80a Hispana Esperanto-Kongreso.



Finfine, post la interkonsento atingita de la Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kun la Kantabra Esperanto-Asocio (KantEA) kaj la loka Magistrato de Comillas, oni jam povas anonci ke la 80a Hispana Esperanto-Kongreso okazos en **Comillas** (pr. Komijas), **de la 29a de aprilo ĝis la 3a de majo, en la jaro 2022.**

La nova LKK estas jena:
 Prezidanto: Miguel Gutiérrez Adúriz
 Sekretario: Pedro Ullate López
 Kasistino: Guadalupe Barcina Amézaga
 Rilatoj kun institucioj: Carlos Cordero Huecas
 Membroj: Rafael Moncalián García
 Rosa Santiago Mancebo
 M. Carmen Blanco Peña

Jam preskaŭ 150 homoj aliĝis. Tio permesas antaŭvidi tre sukcesan kongreson.

Esperantisto elektita Prezidanto de la Kataluna Akademio.



Nicolau Dols Salas, esperantisto naskiĝinta en Majorko, estos la nova Prezidanto de la Filologia Sekcio de la Institut d'Estudis Catalans, kiu estas konsiderata kiel la Akademio de la Kataluna Lingvo.

Nicolau Dols estas profesoro de la Universitato de Balearoj kaj de la Postdiplomaj Studoj pri Interlingvistiko de Universitato de Poznano. Li estis kunprezidanto de la organiza komitato de la ILEI-kongresa simpozio "La kultura heredaĵo de Esperanto", kiu okazis ene de la 51-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlabore kun la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) kaj Hispana Esperanto-Federacio (HEF) en ejoj de UNED en julio 2018. Li gajnis la unuan premion en la branĉo "Poezio", en la Belartaj Konkursoj de 2017, per la poemo "Pasio. Poemo en ses stacioj".

Oni povas legi intervjuon kun li en la revuo Libera Folio.

("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 78. Januaro 2022)


Vizito de lingva eminentulo.

Dum la festoponto de decembro vizitis Madridon José Roberto Arze, direktoro de la Bolivia Akademio de la Hispana Lingvo, por partopreni en kunveno de la Asocio de Akademioj de la Hispana Lingvo, okaze de ĝia 70a datreveno.

Sinjoro Arze, aŭtoro de "Malgranda Bolivia Antologio", tre bone parolas Esperanton. Li profitis la okazon por renkontiĝi dum iom da tempo kun lokaj esperantistoj, babilis pri diversaj aferoj kaj akiri kelkajn librojn el la libroservoj de Madrido.

(Nia Voĉo. Jan. 2022)

Scienca lerneja kalendaro en Esperanto.



elstaraj malkovroj.

La kalendaron oni trovas jam en la adreso: <https://digital.csic.es/handle/10261/256432> (kaj ankaŭ en la HEF-a Bitoteko). La oficialan prezentadon oni faris la 11an de januaro, sed la materialo en Esperanto jam ekaperis de la komenco en la tŭitera konto de la iniciato, kaj ankaŭ en la propra konto.

Ĝin akompanas Didaktika Gvidilo, por ke instruistoj povu ĝin utiligi en lernejoj. La kalendaro ekzistas en versioj en la hispana, galega, astura, kataluna, aragona, eŭska kaj angla lingvoj kaj de tiu ĉi jaro ankaŭ Esperanto, la franca kaj la araba. Pri la esperanta tradukado zorgis teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio.

Ĝin elŝutu, legu, utiligu kaj disvastigu laŭ via plaĉo, speciale se vi iel rilatas kun lerneja institucio.

(*"La Bitbulteno"* de HEF. Nro. 78. Januaro 2022)

Libro "Esperanto kaj esperantistoj en Teruel".



Ĝustatempe por la Tago de la Libro en Esperanto, la asocio "Liberanimo" de Teruel publikigis la verkon "Esperanto kaj esperantistoj en Teruel", verkita de la historiisto Serafín Aldecoa, pri la ĉeesto de la lingvo en tiu provinco. Temas pri dulingva libro, hispane kaj Esperante, kiu estis subvenciita de la regiona registaro de Aragono kaj de Fondumo Esperanto. Oficiala prezento disvolviĝis la 9an de decembro en la Provinca Muzeo, kun partopreno de la aŭtoro kaj de la prezidanto de Liberanimo, Alberto Granados.

La lokaj amaskomunikiloj "El Heraldo de Aragón", "Diario de Teruel" kaj radiostacio "Onda Cero", eĥis la aperon de la libro.

(*"La Bitbulteno"* de HEF. Nro. 77. Decembro 2021)

(María Zocato. "Por ioma cerbumo". 01/12/2021)



Ekovilaĝoj kaj Esperanto.

Ĉe Fejsbuko kaj en Telegram-grupo iuj estas en vigla interŝanĝo por kunigi fortojn kaj energiojn por realigi la ideon de *esperantista ekovilaĝo "Semokorto"* kiu funkcios sub la ombrelo de daŭripoveco, paco kaj edukado kaj interkonektos en amikeco ĉiujn *Esperanto-domojn* en la mondo!

<http://kunfarejo.fr.ali.bplaced.net/?p=4050> <<http://kunfarejo.fr.ali.bplaced.net/?p=4050>>
Ekovilaĝoj en Vikipedio <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ekovilaĝo>

(08/11/2021. El interreto)

Klimato-Konferenco COP26 en Glasgow.

Tutmonda Klimato-Konferenco en Glasgow finiĝis. Oni diskutis „eterne“ pri la akceptebla vortigo flanke de grandaj poluantoj, rezulto: malgranda.

“Akceli klopodojn redukti la uzadon de karbo”. Konsiderante ke karbo estas el ĉiuj la plej granda kaŭzo de altiĝo de la temperaturo, ĉi tiu estas bela granda interkonsento, sed la sindevontigo estis malfortigita de Barato (subtenita de P.R.Ĉinio). Alia celo estas nuligi subvenciojn por ne sufiĉe efikaj fosiliaj brulaĵoj; sed ĉi-rilate ili ne mencias aliajn fosiliajn brulaĵojn (ter-gaso, nafto) krom karbo.

Realeco tutmonde:

-5,4% da CO₂ kompare 2020 kun 2019 (dank al korona-viruso); sed en 2021 denove altiĝas supozeble ĝis la nivelo de 2019. La plej grandaj eligantoj da CO₂ estis 31% de P.R. Ĉinio, 14% de Usono, 7% de Hindio, sekvata de Rusio kaj Japanio . Sed se oni komparas kun la populacio, Usono multe pli eligas po-kape kompare kun la du aliaj. Aparte Hindio kaj Ĉinio forbrulis pli da karbo ol antaŭe. En Usono kaj EU aliflanke oni uzis pli da ter-gaso, sed la CO₂-eligoj reduktiĝis je 10%.

Arbaroj kaj marĉoj devus alpreni pli da CO₂, sed tiuj pro la temperatura altiĝo funkcias malpli bone ol antaŭe (je 15%). La permesata kvanto da CO₂, por haltigi temperatur-altiĝon je 1,5°C je la nuna jara bruligado, estos forbruligota ene de 8 jaroj. Tio signifas ke necesas pli fortaj klopodoj redukti la uzon de fosiliaj brulaĵoj.

Komento de AVE:

La landoj en pli malvarmaj regionoj kompreneble devas investi en izolado; kie tio ankoraŭ ne eblas, necesas redukti temperaturojn en loĝejoj, kio signifas uzi varman vestaĵojn; uzado de varma akvo estas lukso.

Konstruado per betono eligas multe da CO₂; ankaŭ tie oni serĉas alternativojn. Nia trafiko konsumas multe da fuelo; se temas pri elektraĵoj veturiloj, kiuj uzas sunan energion, tamen necesas energio por konstrui tiujn; kaj la ekspluatado de litio konsumas multe da akvo. La konstruado de domoj, necesa pro la urbanizado, estas alia kaŭzanto. Unu el la grandaj kaŭzantoj de CO₂-eligoj estas la militaro tutmonde. Bedaurinde UN ne sukcesas pacigi la diversajn flankojn.

Kaj finfine necesas fini la kreskadon de la monda loĝantaro. Jam nun ni estas tro multaj, ĉar nia planedo estas malgranda kaj ne kreskas. Ni devas lasi ankaŭ sufiĉe da tereno kaj akvo al niaj kunvivantuloj en la naturo.

(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 22/11/2021)

Bovinoj k.s. kaj klimato.

Vi certe scias ke bovinoj, ŝafoj kaj kaproj estas t.n. remaĉuloj. Ĉar ilia natura nutraĵo, gresoj, bezonas apartan prilaboron en iliaj stomakoj, ili havas du diversaj stomakoj. En unu el tiuj estas bakterioj kiuj povas metaboli/malkonstrui celulozon. Sed tiuj produktas metanon, kiun la bestoj eligas. Kaj metano estas simile forta forceja gaso kiel CO₂.

En Irlando oni ĵus evoluas nutro-aldonon el maraj algoj por bovinoj kiuj reduktas la eligon de metano. Finfine necesus redukti la kvanton da bovinoj, ĉar nuntempe eblas bredi pli multe ol la naturo ebligus, ĉar ili ne plu dependas de gresoj, sed ricevas aldone sojlon kaj aliajn proteinriĉajn semojn - fakte oni detruas la praarbarojn por havi pli da paŝtejoj en Amazonio kaj ankaŭ en Europo ktp.; kaj aliflanke en norda Germanio ktp. oni bredas tro da diversaj brutaroj (porkoj, bovinoj, kokinoj, k.s.), dank al tia nenatura nutrado, tial havas tro da sterkoj, kiu poluas la grundakvon.

(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 22/11/2021)

UEA decidis vendi la domon de la Centra Oficejo.

La komitato de UEA per reta voĉdonado faris la finan decidon pri la proponita vendo de la domo en Nieuwe Binnenweg (Roterdamo), kie situas la Centra Oficejo de la asocio. 37 komitatanoj voĉdonis por vendo, 13 kontraŭis vendon kaj 4 sin detenis.

La komitato per klara majoritato akceptis la proponon de la estraro, laŭ kiu la domo de la Centra Oficejo estu vendita je prezo egala aŭ supera al la merkata valoro, kiu laŭ la esploroj de la estraro kaj la ĝenerala direktoro estas proksimume unu miliono da eŭroj.

La oficiala sidejo de la asocio restos en Roterdamo kaj plu nomiĝos Centra Oficejo. Plej kredeble la sidejo troviĝos en malgranda ejo en la teretaĝo de la tiel nomata Volontula domo en Nieuwe Binnenweg 430.

Por la vendo de la nuna Centra Oficejo voĉdonis la jenaj komitatanoj:

Ann-Louise Åkerlund, Aleks Kadar, Amri Wandel, Ángel Arquillos, Dennis Keefe, Andreas Diemel, Prof d-ro Duncan Charters, Emilio Carlos Vaz Cid, Eŭheno Kovtonjuk, Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr., Mark T. Fettes, Gábor Márkus, Guy Matte, Hans Becklin, Kjell Peder Hoff, Trezoro Huang Yinbao, Mag. Janez Jug, Sibayama Zyuniti, Jérémie Sabiyumva, Lee Jungkee, Karina Oliveira, Kristin Tytgat, Ahmad Reza Mamduhi, Michael Boris Mandirola, Alexandra Mendieta, Sino Mallely Martínez Mateos, Michal Matúšov, Mariana Evlogieva, Orlando E. Raola, Rakoen Maertens, Renato Corsetti, Stefan MacGill, So Jinsu, Suzuki Keiichiro, Thomas Bormann, Rodica Todor, Nguyen Van Loi.

Kontraŭ la vendo voĉdonis:

Brian R. Moon, Dietrich M. Weidmann, François Lo Jacomo, Ileana Schrøder, Povilas Jegorovas, Christoph Klawe, Libuše Hýblová, Osmo Buller, Rubén Luis Sánchez, Robert Moerbeek, Spomenka Štimek, Tuomo Grundström, Zsófia Kóródy

Sin detenis:

Chen Ji, Claude Nourmont, Keyhan Sayadpour, Yu Tao

Ne voĉdonis:

Maritza Gutiérrez González, Margarita Želve, Robert Kamiński, Michela Lipari, Paul Desailly, Svetlana Smetanina, Chielismo WANG Tianyi.

(Libera Folio. 13/02/2022)

Prezidanto de UEA salutas la Vintrajn Olimpikojn en Ĉinujo



En kunlaboro kun Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) la Prezidanto de UEA, Duncan Charters, estis invitita kiel honora gasto saluti en Esperanto, nome de UEA kaj de la Esperanto-movado, la Vintrajn Olimpikojn okazantajn en Ĉinujo. La okazo fariĝis unika ŝanco diskonigi Esperanton kaj UEA al la publiko. La originala videa

saluto estas ĉirkaŭ minuta kaj Charters finas per la esprimo “kune por kundividi la estontecon”, kiu estas Esperanto-versio de la slogano de la Vintraj Olimpikoj.

(<http://esperantoilustrita.blogspot.com/> 12/02/2022)

Mesaĝo de UEA al UN kaj Unesko okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo



En la Tago de la Gepatra Lingvo, Universala Esperanto-Asocio festas la kulturalan kaj lingvan diversecon de la mondo. Tiu diverseco estas riĉaĵo kiun ni devas protekti kaj antaŭenigi. Respekto al lingva diverseco estas vojo al plena observo de homaj rajtoj.

La jaro 2022 markas la komencon de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj 2022-2032, kiu ankaŭ estos traktata de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado, en aŭgusto 2022. Sub la temo Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, homoj el dekoj da landoj pritraktos la situacion de indiĝenaj komunumoj kaj iliaj lingvoj.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. 21/02/2022)

Noto pri trompo-provoj per Esperanto: esperantistoj restu atentaj!

UEA konstatis amasiĝon de retaj trompo-provoj uzantaj Esperanton. La trompo-provoj plej ofte okazas per retroŝto kaj trompisto per sufiĉe konvinka Esperanto celas akiri informojn kaj monon de nesuspektemaj homoj. La trompo-provoj ne venas de esperantistoj: rimarkeblas la uzado de tradukiloj kiel Guglo-Tradukilo, sed pro la altiĝo de la kvalito de tiuj servoj, la redaktostilo povas simili al tiu de fluparolanto. Tiuj trompo-provoj ne estas novaj: trompisto provas de jaroj fiagi per diversaj lingvoj, lastatempe ankaŭ per Esperanto, kaj la reta kaj telefona trompo-provado signifne kreskis en la pandemio epoko, kiam diversaj proceduroj povas nun okazi plene rete.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. 19/02/2022)